Jürgen Henkys,

La 23a psalmo

tradukita de Manfredo Ratislavo

1. Paŝtisto mia estas mia Dio.
Li gvidas min, ne mankas al mi io.
Li gvidas, sekvas mi ĝis verda monto,
jen kie estas pura, freŝa fonto.
Li daŭre min per akvo refreŝigos.
Neniam Li min ial pereigos.

2. Kondukas la Sinjoro de l' ĉielo
sur ĝusta voj' min ĉiam al la celo.
Kaj kvankam migras mi tra ejoj ombraj,
tra val' malhela, inter muroj sombraj,
Vi estas apud mi, min gardas Via
baston', ne trafos min malbono ia.

3. Kaj malgraŭ malamika ar' envia
regalas Vi min per manĝaĵo ĉia.
Vi oleumas bene kapon mian
renovigante interligon Vian.
Ne ĉesos ja boneco Via iam.
En Via domo restas mi por ĉiam.

Traduko de la Germana poemo "Der 23. Psalm" de Jürgen Henkys *(∗1929-11-06) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2005-02-28.*

MR-433-1 / Arg-801-1607 (2013-01-31 11:14:04)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejnn `http://de.wikipedia.org/wiki/J%C3%BCrgen_Henkys`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.v-r.de/de/person-0-0/juergen_henkys-4331/`.